FN PAR ANC 47


# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj

n° 174

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

MARTO 1992A , VINTRO 1991-1992A , N° 89A NOVA SERIO.

Minimuma kotizo por 1992 : 45 frankoj, CCP 283 40 H ROUEN
Sendu vian postĉekon rekte al via CCP Centro
bankĉekon al Pierre Quillaud
16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly



Redaktas : Yves Nicolas 17 37 Quartier du Bois
14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81


# SANS VOUS NOTRE UNION MEURT !

*L'arrivée de cette nouvelle année que nous souhaitons heureuse pour tous doit être l'occasion de nous poser quelques questions sur notre but et sur notre action.*

*Le but : c'est bien sûr faire connaître notre langue, ses qualités, sa valeur, son idéal. De cela nul espérantiste ne doute. Les évènements actuels avec la croissance de la xénophobie et le réveil des vieux nationalismes endormis prouvent combien était juste le combat entrepris par Zamenhof contre la "inter-genta malamo". Ils justifient également l'action anationaliste menée par Lanti au sein de S. A. T.. L'Espéranto n'est pas neutre face aux poseurs de bombes corses, irlandais, basques, serbes ou croates. L'Espéranto n'est pas neutre face aux différents intégrismes et fanatismes.*

*Dans notre région, existe notre Union des Espérantistes de Normandie qui devrait oeuvrer pour faire connaître et pratiquer l'Espéranto. Remplit-elle bien son oeuvre ? Depuis quelques années, nous constatons un essouflement de notre association. Chez nous les "septennats" se succèdent avec les mêmes responsables qui attendent en vain la relève. Il en résulte un manque d'imagination nécessaire pour réactiver notre union. Nous avons dû plusieurs fois annuler notre Assemblée Générale en raison du manque de participants. Nos statuts ne sont plus observés. La seule activité reste la parution de notre maigre bulletin. L'Union des Espérantistes de Normandie avait été créée pour regrouper dans la même association les espérantistes de différentes tendances (Cheminots, UFE, SAT, FET,...) ; c'était une réalisation unitaire. Mais à*

***MAIS A QUOI BON L'UNITE SI C'EST POUR NE RIEN FAIRE ?***

*(suite page*

*Heureusement pour l'Espéranto, les associations nationales réalisent un travail positif. L'UFE fait preuve de vitalité dans les domaines de la propagande (Minitel, Expolangues...), de la culture (Franca Antologio, Kultura Festivalo), des relations internationales etc... SAT-Amikaro fait aussi preuve de dynamisme ; l'an dernier le congrès d'Amboise avec plus de 300 participants a été une grande réussite. Le Congrès de Pâques 1992 à Bordeaux devrait aussi avoir un grand succès. C'est le groupe normand d'Hérouville Saint Clair qui organisera le congrès de 1993. La Fédération Espérantiste du Travail édite aussi une revue mensuelle très intéressante. Ne soyons donc pas pessimistes. Malgré le silence des médias (mais écoutez France Culture en Avril !), malgré les préjugés, l'Espéranto progresse en France.*

*Beaucoup de nos adhérents n'ont adhéré ni aux organisations nationales (UFE, SAT-Amikaro, FET, Cheminots, Catholiques...) ni aux organisations mondiales (UEA, SAT...), l'appartenance à notre Union Normande leur semblant suffisante (à cause peut-être de la modicité de la cotisation). A cause de cela, ne peut-on pas se demander si notre action n'est pas devenue négative ? Faut-il supprimer l'Union des Espérantistes de Normandie ? Faut-il la transformer ? Comment et avec qui ? Faut-il changer son nom ? Par exemple "Espéranto-Normandie". Devons-nous en faire une simple coordination de groupes locaux avec parution d'un simple bulletin de liaison intergroupes ?*

*Nous devons bien-sûr insister fermement pour que nos membres adhèrent aux grandes associations ci-dessus citées ainsi qu'au Groupe d'Action pour l'Espéranto et ne restent pas isolés.*

*Nous aimerions connaître vos opinions. Faites les connaître au Président de l'UNE, au rédacteur de ce bulletin ou à l'auteur de cet article. Dankon !*

Respondu ! Reagu ! Petro KIJO Proponu !

*******************************************************************************

**INTER NI**

*Kun granda ĉagreno ni ricevis la informon pri la forpaso de nia samideano Alphonse* **LEGRET. Li mortis en februaro, 86 jaraĝa. Nia Unuiĝo regule rilatis kun li, ĉar Sro Legret por ĉiu bulteno preparis artikolon pri la vivo de la movado en sia urbo VIRE.** *En oktobro 90, li partoprenis la Ĝeneralan Asembleon en Hérouville. Ĝis la fino de la vivo li fervore agadis por Esperanto kaj animis la lokan grupon.*

*Ni kuniĝas kun la tieaj amikoj kaj liaj familianoj por konservi en la koro la memoron de tiu neforgesebla esperantisto.*

## *PAROLAS LA KASISTO*

*Ni petas vin : bonvolu pagi vian kotizon por 1992. Ni nepre bezonas monon por daŭrigi nian agadon.*

*Ni bedaŭrinde konstatas, ke multaj el vi forgesis pagi sian 91an kotizon. Ja, ni ricevis nur 58 kotizojn dum ni sendis bultenon al proksimume 100 personoj.*

*KONTOJ 1991*

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Jarkomence* | *+ 4643* | *Bultenoj :* | *- 2100* |
| *Kotizoj :* | *+ 3915* | *Diversaĵoj* | *- 325* |
| | *+ 8556* | | *- 2425* |

*Ni disponas ĉe CCP la 31an de Decembro 1991 :*

*8558 - 2425 = 6133 F.*

**************************************************************************

## INTERNACIA SOLIDARECO

Plej multaj esperantistoj loĝas en orienteŭropaj landoj. Tie la vivkondiĉoj fariĝis tiel mizeraj kiel tiuj de milita tempo.

En Kroatio, cent miloj da homoj devis fuĝi pro serba agreso. Vukovar fariĝis simbolo kiel Stalingrad dum Dua Mondmilito.

Sur niaj televidekranoj, ni povis vidi longajn vicojn da homoj atendantaj antaŭ malplenaj magazenoj el Moskvo kaj Sankta Petesburgo. En Rumanio, ne pliboniĝas la situacio. Same en Bulgario kaj aliaj landoj.

Kelkaj el ni havas korespondamikojn en tiuj landoj. Malgraŭ nunaj malfacilaĵoj, ni povas helpi ilin sendante frankojn aŭ markojn en registrita letero aŭ nutraj pakaĵojn (ĝis 2 kilogramoj).

La internaciaj asocioj (UEA, SAT...) ne plu ricevas valorajn kotizojn de tiuj landoj. Ankaŭ niaj plej interesaj gazetoj (Monato, Heroldo,...) ne plu ricevas abonojn.

**Pagante kotizon kaj abonon por orienteŭropaj samideanoj, ni samtempe helpos ilin kaj esperantistan movadon.**

Petro KIJO

**************************************************************************

## *Aldone al la frontpaĝo*

*Por doni mian opinion pri la estonto de nia Unuiĝo, kiel "redaktoro" de la bulteno mi konstatas ke jam de longe nur kelkaj membroj esprimiĝas en nia ĉefa ligilo. La bulteno enhave kaj aspekte tute ne povas kuraĝigi kaj instigi la legantojn. Ĝi jam estas nur ligilo inter la grupoj nome Vire, Le Havre, Grand Quevilly, Yvetot, Caen, Hérouville. Nia Unuiĝo ne plu ekzistas kiel ariĝo da unuopuloj, sed kiel senstruktura reto da grupoj en vasta (tro ?) regiono. Ni akceptu tiun konstaton, kaj adaptiĝu al tiu nova situacio. Ni ne plu perdu niajn fortojn por vivigi fantomon. Ni konstruu fortajn lokajn grupojn, ni propagandu por ke ĉiu estu membro de naciaj kaj internaciaj asocioj.* ***Kiam nia regiono denove estos tre forta, certe tiam aperos bezono de Unuiĝo.***

# NI KAJ LA MOVADO

*Esperantista movado strukturiĝas dank'al reto da internaciaj kaj naciaj asocioj, revuoj, aŭ kulturaj centroj. Ili proponas al ni eldonaĵojn, kongresojn, kursojn . Sen tiuj strukturoj Esperanto ne plu ekzistus. Sed ili bezonas nin por daŭrigi la ĉienan agadon. Abonu, aliĝu, partoprenu, vi ricevos multe po malmulta elspezo.*

## *INTERNACIAJ ASOCIOJ*

*UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (UEA) : Nieuwe Binnenweg 176, 3015BJ Rotterdam, Pays Bas*
*Eldonas tre kompletan "JARLIBRON" kun adreso de fakaj asocioj, kaj de tutmonda delegitaro. Organizas jaran Kongreson, en 1992 en Vieno.*

*SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (SAT) : 67, Avenue Gambetta 75 020 Paris*
*Eldonas "Jarlibron" kun la nomo de aliĝantoj en dekoj da landoj. Kongresas ĉiujare, en 1992 en Kaŭnas (Litovio).*

## *NACIAJ ASOCIOJ*

*UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO (UFE) : 4bis, rue de la Cerisaie 75 004 Paris. Tel. 16 1 42 78 68 86. Membro de UEA, eldonis Francan Antologion, organizas Kulturan Festivalon.*

*SAT-Amikaro : adreso de SAT. Tre aktiva sur propaganda tereno. 92a Kongreso : Bordozo. Tel. de la asocio : 16 1 47 97 87 05*

## *FRANCAJ KULTURAJ CENTROJ*

*KASTELO GRESILLON : 49150 BAUGE. Tel. 41 89 10 34. Tre bela kastelo por kursoj diversnivelaj kiuj nun famas tutmonde.*

*LA KVIN PETALO : SYM 86 410 BOURESSE. Dometoj en agrabla vilaĝo, kun tre kompetantaj instruantoj.*

***************************************************************************

ESPERANTO SUR "FRANCE-CULTURE"

++++++++++++++

Okaze de 75a datreveno de morto de Dro ZAMENHOF (14a de Aprilo 1917), kaj en la kadro de sia elsendo"LES CHEMINS DE LA CONNAISSANCE",FRANCE-CULTURE organizos serion de diskutoj pri nia lingvo,ĉiutage de 10 h 40 ĝis 11a horo de la 13a de Aprilo ĝis la 17a de Aprilo:

Lunde 13a de Aprilo:Historio de Pierre Janton

Marde 14a:Neceso de internacia lingvo de Claude Piron

Merkrede 15a:Esperanto en la mondo de Claude Gacond

Ĵaŭde 16a: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto de Michel DUC Goninaz

Vendrede 17a:Esperantismo kaj esperantistoj en Francio

Aŭskultu tiujn elsendojn,registru ilin per magnetofono kaj informu viajn geamikojn.